

## REZOLUCIOJ DE UNESKO

### A) Ĝenerala Konferenco de UNESKO, Montevideo, 1954

**IV.1.4.422** – La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favora al Esperanto ;

**IV.1.4.4221** – Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo ;

**IV.1.4.4222** – Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO ;

**IV.1.4.4223** – Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo ;

**IV.1.4.4224** – Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantajn ambaŭ organizaĵojn.

=====

### B) Ĝenerala Konferenco de UNESKO, Sofio, 1985

#### La Ĝenerala Konferenco,

**Konsiderante**, ke ĝi en sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, per la rezolucio IV.1.4.422-4224 notis la rezultojn, atingitajn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj reciproka kompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonis, ke tiuj kongruas kun la celoj kaj idealoj de UNESKO,

**Memorigante**, ke Esperanto intertempe faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj,

**Rekonante** la grandajn eblojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikadon inter popoloj de malsamaj naciecoj,

**Notante** la tre gravan kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe de Universala Esperanto-Asocio, al la disvastigado de informoj pri la agado de UNESKO, same kiel ĝian partoprenon en tiu agado,

**Konscia** pri la fakto, ke en 1987 oni festos la centjariĝon de la ekzisto de Esperanto,

**1. Gratulas** la Esperanto-movadon okaze de ĝia centa datreveno,

**2. Petas** la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj racioj kaj kulturoj,

**3. Invitas** la Ŝtatojn-Membrojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo pri la lingva problemoj kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado,

**4. Rekomendas** al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive de tiuj pri la agado de UNESKO.

=====